

KRISTNASKAJ KANTOJ EL DIVERSAJ LANDOJ

Por aŭdi la melodion, klaku al ligilo sub la teksto /SHIFT = sageto supren + samtempe per maldekstra muso sur la ligilon).

Por elŝuti ĝin al via komputilo, klaku per dekstra muso

al MIDI (sube de la koncerna interreta paĝo) kaj klaku al „Uložit cil jako...“ = – „Konservi celon kiel ...“)

ALESTU, FIDELAJ (*melodio: Adeste fideles*)

1. Alestu, fidelaj, ĝoje triumfantaj, venu, ho venu vi al Betlehem!
Vidu naskitan Reĝon de anĝeloj!
Ni venu kaj adoru, ni venu kaj adoru,
ni venu kaj adoru al Kristo, Sinjor'!
2. Dio el Dio, Lumo el la Lumo, tamen naskita el la virgulin';
Dio en vero, Die generita:
Ni venu kaj adoru, ni venu kaj adoru,
ni venu kaj adoru al Kristo, Sinjor'!

melodio: <http://www.oocities.com/cigneto/thctxt/a/alestufid1.html>

ĜOJU LA MONDO! (*Joy to the World – melodio: Lowell Mason, onidire laŭ Handel*)

1. Ĝoju la mondo: venis jam al tero la Sinjor'
Lin bonvenigu ĉiu kun ĝojo kaj kun amo:
Jubilu ĉiu kor'! Jubilu ĉiu kor'! Jubilu, jubilu ĉiu kor'!
2. Ĝoju la ter'! alvenis jen Jesu', la Mondsavant'.
De bestoj kaj de homoj, de monto kaj baseno,
Resonu ĝoja kant'! Resonu ĝoja kant'! Resonu, resonu ĝoja kant'!
3. Teron li regas per la grac', per vero kaj inspir'!
La gentojn li alĝvidas al justo kaj al paco,
Al amo kaj al mir'! Al amo kaj al mir'! Al amo, al amo kaj al mir'!

melodio: <http://oocities.com/cigneto/thctxt/gx/gxojulamo1.html>

JEN KIU BEBO? (*What Child Is This? - melodio: Greensleeves*)

1. Jen kiu bebo dormas ĉe la sino de Maria?

Paŝtistoj gardas dum supre bardas anĝeloj per laŭdo aria.

Jen Kristo, la beba reĝo, kun stala trogo por trona seĝo.

Alhastu por laŭdi al la bebo, la fil' de Maria!

2. Do mirhon, oron kaj olibanon ni al la bebo donu.

Nin savas Kristo el sorta tristo, do amaj koroj lin kronu!

Laŭtkriu la gloran kanton! Maria lulas la beb-Savanton.

Ĝojkriu, "Naskiĝis Kristo, la bebo, la fil' de Maria!"

melodio: <http://www.oocities.com/cigneto/thctxt/j/jenkiubeb1.html>

PACA NOKT' (*Stille Nacht, heilige Nacht; Tichá noc*)

1. Paca nokt', sankt-vesper' , dormas jam tuta ter',

nun rigardas la sankta hom-par' , dorman Bebon kun bukla harar'

/: en la ĉiela ĉarm' :/.

2. Paca nokt' – sankt-vesper' , sonas jam tra l'aer'

hora kanto de anĝelar' al mirigita la paŝtistar' ,

/:pacon al la homar' :/.

3. Paca nokt' , sankt-vesper' , Dia Fil' , mondesper' ,

dum vi dolĉe ridetas al ni, Dia amo montriĝas en vi,

/:Kristo savas nin, Di' :/.

melodio: <http://oocities.com/cigneto/thctxt/p/pacanokts2.html>

ĴUS NASKIGIS (*franca kristnaska kanto – Il est né*)

Refreno: /:Ĵus naskiĝis infan' de Di'; sonu la ŝalmo kaj la trumpeto.

Ĵus naskiĝis infan' de Di'; gaje sonu la melodi' :/.

1. (*Solo*): Kristo venos laŭ la vizi', laŭ aŭguro de la profeto.

Kristo venos laŭ la vizi'; venos tempo de harmoni'. *Refreno*

2. (*Solo*) Plaĉe belas Li kun graci'; cu ne ĉarmas la infaneto?

Plaĉe belas Li kun graci', la Savanto kaj la Mesi'. *Refreno*

3. (*Solo*) La novaĵ' estas sensaci': eta Reĝo en dormkvieto.

La novaĵ' estas sensaci'; ni adoru Lin kun pasi'. *Refreno*

melodio: <http://www.oocities.com/cigneto/thctxt/j/jennaskig1.html>

Sub frida vintra luno (*Hurona karolo*)

lau melodio de franca popolkanto el la 16-a jarcento (Une petite pucelle) verkis hurone Jean de Brébeuf en 1640

la originala titolo: Estennialon de tsonoue, Jesus Ahatonhia

1. Vi homoj, kuraĝiĝu : naskiĝis Krist' Jesu'!
Kaj kantu ĝoje, gaje, adorante sur genu'.
Ĝojkriu ĉiu adoranto laŭ la glora anĝelkant':
*Jesous ahatonhia**, Jesu' naskiĝis! *In excelsis gloria!*
2. Sub frida vintra luno, kiam birdoj fuĝis for,
De l' Spiritego venis anstataŭe anĝel-hor'.
Paliĝis steloj antaŭ ĝi; ĉasistoj miris pri l' ari':
*Jesous ahatonhia**, Jesu' naskiĝis! *In excelsis gloria!*
3. En vigvamaĉ' kaduka, el rompita arboŝel',
La bebon ili trovis en ĉifon-kunikla fel'.
Dum la ĉasistoj venis, jen resonis supre la antem':
*Jesous ahatonhia**, Jesu' naskiĝis! *In excelsis gloria!*
4. Ho anoj de l' arbar' libera, Spiritegidar',
Ĉe l' sankta bebo homa-dia riverencu, ĉar
Li venas por vin doti per la belo, paco, ĝojo, ver':
*Jesous ahatonhia**, Jesu' naskiĝis! *In excelsis gloria!*

melodio: <http://members.shaw.ca/tunebook/huron.mid>

BIM BOM! SONAS EL ĈIEL' (*Ding!Dong!Merilly on High*)

1. Bim bom! Sonas en ĉiel' resono sonorila.
Bim bom! Sonas de anĝel' la kanto tre jubila:
Gloru ni, hosana en la alto!
2. Ankaŭ tie ĉi sur ter' preĝeja tur' sonoru.
Kantoj fluu tra aer', ĉar Dion ni adoru:
Gloru ni, hosana en la alto!
3. Pie preĝu en maten', vi kantu en vespero.
Ĉie reĝu la refren', vi ĉantu kun sincero:
Gloru ni, hosana en la alto!

melodio: <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/d/dingdogp1.html>

BURĜONIS ROZ-ARBEDO (*Es ist ein' Ros' entsprungen*)

1. Burĝonis roz-arbedo el delikata sin'
laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-tempo
je noktomeza hor'.
2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj bon'.
3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum';
la nokton ĝi forpelas per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto savas;
Li, hom' kaj Di' en ver'.

melodio: <http://oocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>

STARIS REĜO VENCESLAS (*Good King Wenceslas*)

1. Staris Reĝo Venceslas vintra en vespero;
ĉie neĝon vidis li, altan sur la tero.
Jen aperis malriĉul' per lunlumo hela,
kolektante lignon en frosto la kruela.
2. Reĝo: "Ho paĝi', jen kamparan'! Diru lian nomon:
Diru kie povos ni trovi lian domon?"
Paĝio: "Malproksime li, Sinjor', loĝas sur la monto,
apud rando de l' arbar' kaj la sankta fonto."
3. Reĝo: "Vidon kaj viandon ni portos en la domon:
ne hodiaŭ la malsat' premos tiun homon."
Do la reĝo kaj paĝi' iris en vespero
tra la brua, frosta vent', akra la vetero.
4. Paĝio: "Nokto pli malluma nun, pli sovaĝa estas;
timon sentas mia kor', forto ne plu restas."
Reĝo: "Vidu, kie paŝas mi, en la signojn paŝu,
por ke vintra vent' al vi furiozon kaŝu"..

5. Post la reĝo la paĝi' zorge do paŝadis:
en la signoj de l' sanktul' varmon li trovadis.
Ho Kristanoj, se al vi estas ia riĉo,
helpu al la senhavul'; benos vin feliĉo.
6. Ni memoru, amikar', pri la malriĉuloj
en Kristnaska tempo, kaj estu donemuloj.
Ĉar la paco de l' homar' estas nia revo,
amo al aliaj ja estas nia devo.

melodio: <http://oocities.com/cigneto/thctxt/s/starisreg1.html>

PACVESPERON, PACNOKTON

vortoj: *G.Scherer*

tradukis: *Wiesław Tomaszewski*

muziko: *Johannes Brahms - Lulkanto*

1. Pacvesperon al vi, pacnokton al vi -
dum dorn' sub kovril' el roz' kaj lili'.
/:Morgaŭ, se volos Di', vekos vin sunradi':/
2. Pacvesperon al vi, pacnokton al vi,
al dolĉa song' pri, Krist-Beba abi'.
En la song' Gard-Anĝel' gvidu vin tra l' Ĉiel'!:/

melodio: ekz. http://members.tripod.com/ah_coo/brahms.mid

Kelkdeko da aliaj kristnaskaj kantoj kun tekstoj kaj melodioj en midi formato troviĝas

**Kristnaskaj Kantoj
en TTT-Himnaro Cigneta
kaj aliloke en Esperanto**

<http://oocities.com/cigneto/thcind/kristnasko.html>

Kompilis Pavla Dvořáková (redakce@esperanto.cz)